

Eŭropa Bulteno

Decembro 2012, Numero 122

NOVJARRESUME



Estimataj legantoj!

La jaro malantaŭ ni estas ege sukcesa jaro por EEU. Ni havis vere gravajn atingojn. La irlanda prezidento kaj same la eksterlandministrino skribe atestis gravecon de Esperanto kiel grava kulturheredaĵo de Eŭropo, kio estas kontraŭa al la aserto de EU-burokratoj kiuj malakceptis nian proponon pri popoliniciato rilate Eŭropan himnon. En Triesto ni havis escepte gravan, verŝajne unikan konferencon en kiu Esperanto estis unu el la tri laborlingvoj kaj en kiu partoprenis aro da eminentaj politikistoj. Nia monpeto kadre de EU-komisiono por la projekto LINGVO.INFO estis aprobita kiel la plej financgranda mona aranĝo de EEU iam ajn ĝis nun (eŭropa financado per 400.000 euroj), Eŭropa Komisiono plilongigis la mandaton de Neregistara Laborgrupo pri Multlingvismo en kiu EEU estas membro kaj eĉ akceptis plian E-organizaĵon: E@I kiel membro. Okazis aro da politikaj kontaktoj kiujn ĉefe realigis nia prezidanto D-ro Seán Ó Riain kaj Jozef Reinvar t je tre superaj niveloj. Nia kongreso en Galivo estis negranda sed ege sukcesa kaj ekzemplodona pro elekto de temo interesa por la

irlandaj sciencistoj kaj aŭtoritatoj pro kio en ĝi prelegis eĉ kvar gravaj irlandaj aŭtoritataj prelegantoj – inter kiuj tri en Esperanto.

La kampanjo pri Eŭropa himno malgraŭ la formala provizora malsukceso tamen portis multajn bonajn fruktojn. Flory eĉ kantis ĝin antaŭ la prezidanto de EU Van Rompuy, Seán havis intervjuon pri tio ĉe TV-Arte kaj aperis multaj artikoloj pri tio. Kelkaj korusoj en diversaj landoj jam havas la himnon en sia repertuaro.

Tiun ĉi jaron EEU proklamis LA JARO DE TIBOR SEKELJ kaj tiu kampanjo montris bonegajn rezultojn, ĉar ĝi stimulis multajn societojn kaj asociojn ne nur en Eŭropo fari ion publikan pri kio la publikaj rimedoj interesiĝis.

La financa situacio, malgraŭ komenca stato, estis stabila, kaj dank al saĝa monmanipulado de nia direktorino Maja Tišljar kaj vicprezidantino Flory Witdoeckt estis sukcesa kaj pozitiva. Planoj kaj esperoj pri la sekva jaro restas ambiciaj malgraŭ ĝenerale ĉiam pli neseкура ĝenerala situacio en Eŭropo kaj la mondo. Ni restu optimistoj.

La estraro de EEU deziras al vi ĉiuj jaron kiu grandan plimulton el vi lasos kontentaj pro sukcesoj kaj cirkonstancoj ĉirkaŭ vi kaj pro via kaj nia komuna antaŭenmarŝo sur la vojo de Esperanto.

La redaktoro

PROJEKTO DE EEU LINGVO-INFO STARTIS



Kiel ni informis jam en la pasinta numero, EEU transprenis la kunordigadon kaj la ĉefan respondecon pri la realigo de la projekto LINGVO.INFO kiun aprobis Eŭropa Komisiono kunfinancante ĝin per proksimume 400.000 eŭroj. Tio estas laborego kiun oni devas efektiviĝi per profesia laboro, ĉar dum la du jaroj (inter decembro 2012 kaj decembro 2014) ni DEVAS efektiviĝi ĉion planitan en la projekto kaj prizorgi la mondistribuon kaj raportadon. La tutan laboron transprenis Maja Tišljar, kiu ja estas aŭtoro de la projekto (la ideoj venis de Jevgenij Gaus kaj Petro Baláž, sed Maja kunmetis la projektom mem) kaj helpas en la laboro ankaŭ Nikola Rašić kaj Zlatko Tišljar, kaj kompreneble Flory Witdoeckt kiel kasistino. En la projekto partoprenas ok aliaj partneroj, edukinstitucioj, entreprenoj, neregistraj organizoj el

Slovakio, Slovenio, Germanio, Pollando, Danlando kaj Litovio. Inter ili estas Suddana kaj Poznana universitato kaj la Slovaka nacia lingvoinstituto.



La projekto startis per la unua kunsido de ĉiuj partneroj: venis po du reprezentantoj de ĉiuj 9 partneroj kaj entute ĉeestis 20 personoj. La tritaga kunsidado okazis en Bratislavo kaj organizis ĝin la slovaka partnero E@I. Ĝi estis ege labora kaj kontentiga. Maja Tišljár gvidis la kunsidojn unue prezentinte multajn detalojn pri la organiza gvidado kaj administrado, financa kontrolado ktp. Poste oni komencis plidetaligi la laborplanon en kiu partoprenis ĉiuj kaj la fina rezulto estis komenca starigo de

taskaro ene de 4 subgrupoj de la planata paĝaro lingvo.info kies esenca celo estas interesiĝi neinteresitan publikon, ĉefe junan (inter 12 kaj 25 jaroj) pri lingvoj, ilia graveco kaj signifo.

Do, ne temas pri iu plia paĝaro por lerni lingvojn, sed paĝaro kun multaj informoj pri lingvoj, ludoj lingvaj kaj amuzaj, kvizoj kaj informoj nekutimaj kaj allogaj rilataj al lingvoj kaj iliaj parolantoj. La ĉefa tasko estas kompreni, ke ĝi ne rajtas esti teda paĝaro kiu forlogos ĝuste tiujn gejunulojn kiuj per si mem ne havas intereson pri lingvoj. Inverse: ĝi devas kapti la tujan intereson de ili resti sur la paĝaro. Tute ne facila tasko, multega laboro, des pli ke oni devos produkti ĉion en 18 lingvoj (inter ili memkompreneble ankaŭ Esperanto) por parolantoj de la elektitaj 18 eŭropaj lingvoj kaj ĉion necesos programi kaj krei desegnan bazon.

La aranĝo okazis inter la 12-a kaj 15-a de decembro. Inter la 9 partneroj nur du (litovaj) ne havas esperantistojn, ĉiuj aliaj jes. Formale la laborlingvo de la partneroj estas la angla, sed Esperanto estas la ĉefa lingvo en la paŭzoj kaj ĉiuj aliaj komunaj aranĝoj kaj fojfoje ankaŭ iu parolas dum la kunsidoj en Esperanto.

Ĉar ni kune kun aliaj partneroj mem devas trovi proprajn 133.000 eŭrojn (la kondiĉo estas ke la plenumantoj de la projekto devas trovi mem 25% de la bezonataj kostoj), ni invitas ĉiujn membrojn de EEU kaj petas ilin serĉi ankaŭ inter siaj neesperantistaj amikoj aŭ eĉ organizaĵoj, kontribui per financa helpo. Ni kune kreu vere reprezentan produkton kiu dum multaj jaroj estos uzata en la reto kaj kadre de kiu Esperanto havos elstaran rolon.

Zlatko Tišljár

RENKONTIĜO KUN VICPREZIDANTO DE EŬROPA KOMISIONO

Dum mia deĵorvojaĝo al Bruselo la 4-an de decembro 2012 mi sukcesis renkontiĝi kun mia eksa kolego de la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj Maroš Šefčovič, kiu aktuale funkcias kiel Vic-prezidanto de Eŭropa Komisiono. Al liaj kompetencoj apartenas administra kunordigado inter institucioj de EU, kontaktoj kun Eŭropa Parlamento kaj naciaj parlamentoj de 27 EU membro-ŝtatoj. Li respondecas ankaŭ pri administrado de 56 mil oficistoj kaj dungitoj de ĉiuj institucioj kaj agentejoj de EU.

Celo de mia renkontiĝo kun li estis informi lin kaj interŝanĝi kun li opiniojn pri tereno, pri kiu li aktuale ne respondecas, sed kiu estas en EU neglektata, ĉar ĝi estas ĝis nun je nacia nivelo en kompetencoj de naciaj ŝtatoj. Temas pri kultura dimensio de la eŭropa integriĝo (lingvaj kaj kulturaj temoj kaj problemoj de EU). Malgraŭ granda okupiteco de la Vic-prezidanto mi havis kun li 20 minutan interparolon.



Mi informis lin nome de la Civitana Socia Platformo de EU por Multlingvismo (Civitana Platformo) pri ĉefaj rekomendoj de civitanoj, kiuj estis prezentitaj al Eŭropa Komisiono, kiel ekzemple pri sukcesa projekto en 4 elementaj lernejoj en Britio „Lingvolanĉilo“, enkondukon en lingvo-lernadon. Mi transdonis al li raporton de Angela Tellier, aŭtorino de la raporto pri 5-jara funkciado de la projekto, atingitaj rezultoj kaj spertoj de kuraĝigo de infanoj al lingvolernado kaj plifaciligoj. Samtempe mi informis lin pri

rekomendo de la Civitana Platformo prepari sciencan esploron en EU-membro-ŝtatoj por pliefikigi lingvo-lernadon, por ekscii, kiu unua fremda lingvo pli kuraĝigos kaj helpas lingvo-lernadon de dua kaj pliaj fremdaj lingvoj.

Krom tio mi koncize informis lin kaj donis al li mian raporton pri lingva konferenco de Eŭropa Komisiono en Limasol, Kipro la 26-28an de septembro 2012 „Multlingvismo en Eŭropo“, dum kiu oni taksis la 10-jaran klopodon de subteno de multlingvismo en EU. Bedaŭrinde rezultoj de civitana enketo/esploro Eŭrobarometro de 2012 en 27 EU membro-ŝtatoj pri lingvo-scio en Eŭropo estis je 1 – 3 % malpli bonaj ol estis en 2005. Tiu ĉi situacio en lingvo-instruado postulas de ĉiuj instru-institucioj vere novigajn alirojn utiligante plej bonajn ekzemplojn por kuraĝigi lernantojn, studentojn, plenkreskulojn studi fremdajn lingvojn, helpi kaj faciligi al ili ĝian studadon por akiri, ke civitanoj pliboniĝu en lingvo lernado. Por EU lingvo-instruado kaj lingvo-scio estas unu el prioritatoj de la strategia plano „Eŭropo 2020“, kiu estos grava por plibonigi moveblecon de civitanoj en EU komuna merkato, trovi laborpostenojn kaj akiri ekonomian kreskon. Sen lingvo-scio ne estos ebla plibonigo en tiuj ĉi kategorioj.

Mi rimarkis, ke la jaro 2013 estis deklarita de EU „Eŭropa jaro de civitanoj“. Unu el ĝiaj celoj estos plialtigi prieŭropan konscion de EU-civitanoj. Mi memorigis lin pri la civitana iniciato de Eŭropa Esperanto Unio (EEU), kiu prezentis la 1-an de aprilo 2012 al Eŭropa Komisiono proponon pri komuna kantado de Eŭropa Himno en Esperanto cele al la plibonigo de prieŭropa konscio de civitanoj, se ili ŝatas prezenti ĝin dum diversaj internaciaj eventoj. Estis evidente, ke la vicprezidanto de Eŭropa Komisiono, ne estis informita pri vera propono de EEU civitana iniciato. Li diris al mi, ke li estis informita de kompetentaj oficistoj, ke temas pri enkonduko de instruado de Esperanto en EU. Mi aldonis, ke mi estis surprizita kiam li enkadre de informado de membroj de Eŭropa Parlamento pri prezentitaj proponoj de civitanaj iniciatoj en aprilo, misinformis ilin dirinte, ke inter prezentitaj proponoj de civitanaj iniciatoj estis enkonduko de Esperanto en EU. Surbaze de misinformoj de Eŭropa Komisiono li ne informis membrojn de Eŭropa Parlamento pri vera propono de EEU, kies intenco estis per komuna kantado en neŭtrala lingvo Esperanto kontribui al plibonigo de prieŭropa konscio de civitanoj. Mi kun bedaŭro konstatis, ke Eŭropa Komisiono ne komprenis (konscie aŭ ne konscie) ĉefan esencon de la EEU-propono.



Mi donis al li pakaĵon de diversaj materialoj pri Esperanto, lingvo-politikajn materialojn, DVD-on pri la modela multlingva portalo de EU „Slovae.eu“


www.slovae.eu preparita kaj efektivegita de E@I por multlingva instruado de la slovaka kaj informado pri Slovakio kaj ankaŭ pri finefektivegado de simila multlingva portalo „Deutsch.info“

www.deutsch.info por

instruado de la germana, kiuj estis/as financitaj de Eŭropa Komisiono. Mi akcentis, ke tiuj ĉi projektoj estis efektivegitaĵoj dank al 10-jara reta instruado de Esperanto en 36 lingvoj pre de la portalo www.lernu.net. La vicprezidanto promesis, ke li pristudos la materialojn.

Fine de nia interparolo mi petis lin pri lia rekomendo, kiamaniere eblus antaŭenigi kulturalan dimension enkadre de la eŭropa integriĝo kaj levi lingvajn kaj kulturajn temojn kaj problemojn en EU inter ĝiaj politikaj prioritatoj, ĉar sen tiu ĉi dimensio civitanoj ne povos proksimiĝi al EU kaj senti la eŭropajn integriĝojn proksimaj.

Laŭ li gravas, ke nia agado koncentriĝu al Eŭropa Parlamento kaj naciaj parlamentoj de 27 EU membroŝtatoj por akiri politikan subtenon inter deputitoj, kiuj havas rajtojn postuli de Eŭropa Komisiono kaj taskigi ĝin agi kaj prezenti novigajn iniciatojn en tiu ĉi politike tikla tereno kaj lanĉi tuteŭropan diskuton pri problemoj de multlingvismo kaj multkulturismo kaj



komenci diskuton pri nova komuna lingva kaj kultura politiko de EU. Li promesis al mi, ke ni revenos al tiuj ĉi temoj post kiam li konsultos la materialojn.

Pozitiva rezulto de mia renkontiĝo kun la vicprezidanto de Eŭropa Komisiono estis, ke mi povis objekte informi lin pri pluraj aferoj kaj temoj en kiuj li estis misinformita kaj mi povis transdoni al li plurajn lingvo-politikajn materialojn surbaze de kiuj li povos pli objekte konsideri politikajn temojn, problemojn kaj novigajn solvojn prezentatajn de EEU kaj la Civitana Platformo.

Jozef Reinvart

Membro de Civitana Socia Platformo de EU por Multlingvismo

Oficisto de Ministerio de Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj de Slovakio

LA JARO DE TIBOR SEKELJ KROATIO:

En Kroatio pluraj Esperanto-societoj ligis la feston de Zamenhoftago kun la Jaro de Tibor Sekelj kaj organizis aranĝojn publikajn.

A) Esperanto societo en Varaždín:



Okaze de Zamenhof-tago en Varaždín, Janja Kelava, sekretariino de Esperanto-Societo "Božidar Vančik" Varaždín, organizis prelegon kaj ekspozicion pri Tibor Sekelj en Urba biblioteko "Metel Ožegović", Fako pri la internacia literaturo, A. Cesarca 10, la 14-an de decembro 2012. Prelegis Spomenka Štimec. Fotis Tomislav Kosić. Ĉeestis 19 personoj. Dum la konversacio kun la publiko aperis interalie la demando ĉu Tibor Sekelj sukcesis realigi sian projekton pri Muzeologia vortaro.

Spomenka Štimec

B) Kroatia Esperanto Ligo en Zagrebo

La 19-an de decembro 2012 la zagrebaj esperantistoj komune festis Zamenhoftagon kun la Zagreba Etnografia Muzeo, en ties ejoj (Mažuranićev trg 14). La muzeo tiutage malfermis ekspozicion pri kulturoj de indiĝenoj en foraj landoj, kies ĉefa parto estis objektoj donacitaj de Tibor Sekelj kaj tiel omaĝis lian 100-jariĝon. Dum la vespero oni prezentis novan libron dediĉitan al Tibor Sekelj (trilingvan – en la kroata, angla kaj Esperanto) je 40 paĝoj sub la titolo: Tibor Sekelj – drugi ljudi i krajevi (Tibor Sekelj – aliaj homoj kaj regionoj). Aŭtoroj en la libro estas la nuna direktoro de la Muzeo: Damodar Frlan, Želimir Košćević, Spomenka Štimec, Zlatko Tišljar kaj la centran studon pri etnografiaj esploroj ĝenerale, aparte de homoj devene el Kroatio verkis d-rino Sanja Lazarević.



Dum la solenaĵo parolis la direktoro de la muzeo D. Frlan, prezidantino de Kroatia E-Ligo Judita Rey Hudeček kaj Spomenka Štimatec kiu prezentis prelegon kun fotaro. Ĉeestis centoj da homoj kiuj ankaŭ rigardis la eksponaĵojn de la ekspozicio en granda salono kun dudeko da grandaj vitraj ŝrankoj. Indas vere viziti la ekspozicion kaj tiuj kiuj estos en Zagrebo dum la sekvaj semajnoj venu kaj admiru interesegeajn objektojn: maskojn, instrumentojn, kapkovrilojn, armilojn, ilarojn kaj objektojn por la ĉiutagaj bezonoj.

Zlatko Tišljarić

C) Internacia Kultura Servo en Zagrebo



Kadre de Monato de kroatia libro 2012 Ivica Špoljarec prelegis en la biblioteko Novi Zagreb (B. Magovca 15, Travno, Zagreb) la 7-an de novembro por la gelernantoj de elementa lernejo Gustav Krklec. La temo estis: Tibor Sekelj – 100 jaroj de lia naskiĝo – prelego pri la vivo kaj laboro de esploristo, mondvojaĝanto kaj verkisto. Samtempe en la bibliotekaj ejoj estis prezentita ekspozicio de libroj kaj aliaj objektoj.

Ivan Špoljarec

BOSNIO KAJ HERCEGOVINO

PRI TIBOR SEKELJ EN BANJA LUKA



Mi estis invitita de Esperanto-societo el Banja Luka el Bosnio kaj Hercegovino okaze de Zamenhoftago prelegi pri Tibor Sekelj. Du tagojn antaŭ la planita tago estis terura neĝa ŝtormo en Zagrebo kaj mi timis ke mi ne povos iri, tamen la 10-an de decembro la vetero estis bona kaj mi veturis per mia aŭto tien. Mi ne estis en Banja Luka jam de 30 jaroj kaj mi estis pozitive surprizita pri la kresko de la

urbo, ĝia moderneco kaj pureco. Mi estis tre bone akceptita de tieaj esperantistoj kaj la prelego okazis por ĝenerala publiko de la urbo en Urba biblioteko. Oni aranĝis negrandan sed decan ekspozicion kun la libroj kaj gazetoj de Tibor kaj pri li. Venis trideko da aŭskultantoj kaj la organizantoj estis kontentaj, ĉar venis pli da homoj ol ili atendis kaj iuj kiuj amikas kun

esperantistoj sed ĝis nun ne venadis al prelegoj. Post la enkondukaj vortoj de la biblioteka direktoro kaj estrarano de la societo Miĉo Vrhovac mi prelegis per power-point prezento pri la vivo kaj graveco de Tibor Sekelj. Ĉeestis ankaŭ ĵurnalisto de loka radio.

Montriĝis ke estas bona taktiko organizi publikajn prelegojn pri temoj ne pure rilataj al Esperanto. Tibor estas ankoraŭ nuntempe konata de ĉiuj pliaĝuloj sur la teritorio de iama Jugoslavio kaj venis homoj por aŭskulti pri tiu esploristo kaj verkisto. Esperantistoj de Banja Luka estas sufiĉe multnombraj kaj havas kelkajn kvalitajn membrojn kiuj nun planas interalie aktiviĝi en Eŭropaj projektoj.

Zlatko Tišljarić

SLOVAKIO

Kadre de la festo de Zamenhoftago en Bratislavo la 12-an de decembro en la Pola Instituto kolektiĝis kvindek da esperantistoj. Estis riĉa programo kun muzika koncerto, prelego pri Zamenhof far Ilona Koutny, prezento de novaj libroj far Petro Balaž kaj Zlatko Tišljarić prelegis ankaŭ pri Tibor Sekelj.

ARGENTINIO



Ni en Argentinio faris tri memorigajn omaĝojn pro la centjariĝo de Tibor: - en marto kun la ĉeesto de familianoj de Maria Reznik (lia edzino) kaj speciala mesaĝo de filo Daniel el Usono;
- dum nia 54-a Nacia E-Kongreso en novembro, kie mi prelegis pri li;
- dum Kongreso pri Turismo en Mendoza mi prelegis kaj faris ekspozicion de la libroj de Tibor.

En Mendoza oni tradukis kaj eldonis la verkon "Tempesto super Akonkagvo" en la angla, kiu estas vendita kaj rekomendita por la eksterlandaj turistoj kiuj venas ĉiujare por grimpi sur Akonkagvon... La verko daŭre vendatas en la hispana.

Mi preparis verketon pri Tibor, sed ankoraŭ la redakcio ne estas finita. Daniel, la filo, kunlaboretas iom, mi esperas eldoni venontjare. Mi ankoraŭ ne finis la esploradon pri la tuta vivon de Tibor dum la dekkvin jaroj de lia restado ĉe ni.

Roberto Sartor

ĈINIO


Mi sukcesis kontaktiĝi kun sinjorino Sekelj kaj jam faras korespondadon kun ŝi, tiel ke mia studado pri Tibor progresas, kaj nia laboro por aperi librojn havas bonan perspektivon. Lastatempe mi kaj sinjoro Dongfang Yunzi faris intervjuon kun mia instruistino Li Yuping, kiu iam vizitis Subotica dum ŝia vojaĝo al Jugoslavio kaj persone gastis ĉe Tibor Sekelj. Ŝi montris iujn fotojn kaj libretojn donacitajn de T. S. Tiuj objektoj estas valoraj por nia plua studado kaj la planita eldono de la albumo.



La 15-an de decembro, mi faris denove prelegon por konigi nian karmemoran mond-vojaĝanton en la Pekina Socisciencia Forumo (Jara Forumo okazigata de Pekina Federacio de Socia kaj Sciencaj Rondoĵoj). Mi faris la PPT-dokumenton kaj montris iujn fotojn al la publiko. Ambaŭ mi kaj sinjoro Dongfang esperas, ke nia kunlaboro kun sinjorino Sekelĵ ĝoje progresos, kaj baldaŭ ni ellaboros detalajn planojn.

Yu Jianchao

UEA EN NEREGISTARORGANIZAĴA KONFERENCO DE UNESKO



De la 12-a ĝis la 14-a de decembro kunvenis en Parizo la Internacia Konferenco de la Neregistaraj Organizaĵoj havantaj oficialajn rilatojn kun Unesko. El 371 organizaĵoj 110 aliĝis al la konferenco, sed reale ĉeestis 97. Pluraj delegitoj ne povis veni, ĉar ili ne ricevis vizon ĝustatempe. Nome de UEA, kiu havas oficialajn rilatojn kun Unesko jam ekde 1954, partoprenis Renée Triolle kaj Barbara Despiney, la konstantaj reprezentantoj de UEA ĉe Unesko.

La konferenca temo estis "Kulturo kaj kulturoj: rekunigi universalecon kaj diversecon", pri kiu enkonduke parolis la franclingva kongolanda verkisto Alain Mabankou. Li emfazis, ke Afriko, ekzemple, ne estas io unueca kaj ke afrikanoj ekster Afriko kreas aliajn Afrikojn kaj afrikajn kulturojn. La temo estis traktata en atelieroj.

En tiu pri "Kulturo kaj edukado" prelegis Catherine Deremble, kiu gvidas la Unesko-komisionon pri interkultura dialogo por paco. Laŭ ŝi, pro la multaj devenoj de la eŭropaj lernejoj, la edukado devas garanti la transdonon de ĉies origina kulturo. Al ŝia eldiro, ke por doni al la gejunuloj la necesajn ilojn por, interalie, kulturaj interŝanĝoj, "necesas konsideri, ke la angla estas necesa en tiu perspektivo", Triolle rebatis, demandante, kiel konservi la kulturan diversecon, se jam 95% de la kulturo de la mondo ŝajnas esti anglalingva, kaj la lokajn sciojn, se estos nur unu maniero pensi.

En la labora parto oni elektis la prezidanton de la Internacia Konferenco por dujara periodo. El kvar kandidatoj elektiĝis Patrick Gallaud, kiu vizitis la 87-an UK en Fortaleza en 2002. Oni elektis ankaŭ la membrojn de la Ligokomitato, kiu kunordigas la kunlaboron de NRO-oj kaj iliajn rilatojn kun la organoj de Unesko. Krom ĉeesti la kunsidojn kaj plurfoje interveni en la diskutoj, la reprezentantoj de UEA aranĝis ankaŭ ekspozicion pri Esperanto. Por ke la delegitoj povu pli bone konatiĝi kun la aliaj NRO-oj kaj iliaj agadoj, la konferenca programo enhavis duhoran "liberspacan sesion", dum kiu ĉiu rajtis starigi ekspozicion.

el Gazetara Komunikado de UEA

KONSTITUIĜO DE LA PARLAMENTA GRUPO APOGANTA ESPERANTON EN LA POLA PARLAMENTO



La 12-an de decembro mi kaj Kazimiro, ricevinte kelkajn tagojn pli frue la inviton de la senatano Edmund Wittbrodt, partoprenis la kunsidon de la Parlamenta Grupo Apoganta Esperanton. Ĝi okazis en la salono 179 en la Pola Senato. Unue okazis la elektado de la prezidanto kaj vicprezidanto de la Parlamenta Grupo. Unuanime oni elektis kiel la prezidanton de la Parlamenta Grupo prof. Wittbrodt kaj poste Jan Wyrowiński la vicmarŝalo de Pola Senato proponis kiel vicprezidanton la seĝmaninon Ligia Krajewska el Varsovio kaj ankaŭ unuanime ŝi estis aprobita de ĉiuj seĝmanoj kaj senatanoj. Mi aldonu ke Ligia Krajewska estas seĝmanino de Civitana Platformo kaj krome ŝi estas vicprezidantino

de la Urba Konsilantaro de la ĉefurbo Varsovio. La 17an de oktobro 2012 dum la oficiala inauguro de la ekspozicio en Pola Senato ŝi ĉeestis kaj dum la inauguro ŝi staris ĉe Maria Nowicka (vicprezidantino de Pola Sejmo). Oni diskutis pri la celoj kaj planoj de la agado de la Grupo.



La unua celo estas strebado ke la Pola Senato oficiale agnosku Esperanton kiel heredaĵon de pola kulturo, do samtempe de Eŭropa Unio kaj tio povas helpi en la strebado de EEU ke Eŭropa Parlamento akceptu Esperantan Himnon - ĉar antaŭe EP rifuzis tion ĉar Esperanto ne estas agnoskita heredaĵo de eŭropa kulturo. Post kelkaj tagoj la Prezidanto Wittbrodt letere informos ĉiujn polajn membrojn de EP pri la fondo kaj celoj de Parlamenta Grupo Apoganta Esperanton kaj invitos la kvar

MEP: Jan Kozłowski, Joanna Skrzydlewska, Joanna Senyszyn kaj Tadeusz Cymański por la sekvonta kunsido de la Grupo kiu okazos la 21an de februaro 2013. Por tiu kunsido oni planas ankaŭ inviti prezidanton de EEU d-ron Sean O RIAIN kaj Jozef REINVART kiu estas la slovak diplomato en Bruselo, d-ron Eugeno Macko la vicprezidanton de EDE-Federacio loĝanta en Munkeno kaj sekretarion de EDE-Federacio Stanislaon Rynduch kaj krome ĉeestos mi, Kazimiro kaj Antonio Walaszek. Dum tiu februara kunsido estas planite preparoli la strategion pri la lingvo Esperanto kiel duonoficiala por la EP - kompreneble unue devas aprobi ĝin Pola Senato, Pola Sejmo kaj la decido devas esti transdonita al la Pola Registaro kiu proponus tiam Esperanton al EP kiel duonoficialan. Estas ankaŭ problemo ke la lando proponanta la lingvon por la duonoficiala statuso devas pagi la kostojn de la tradukado en EP kaj tio kostas jare ĉirkaŭ dek mil eŭrojn. Dum la fino de la kunsido mi transdonis belajn dulingvajn invitilojn al la inauguro de la E-ekspozicio "125 jaroj de Esperanto" kiu okazos la 4an de januaro 2013 en Urbodomo de Malborko al la tri Senatanoj de Pomerio kiuj estas la anoj de la Grupo kaj ĉeestis la kunsidon, t.e. al la senatanoj: Wittbrodt, Grzyb kaj Klejna - kaj prof. Wittbrodt promesis veni al Malborko la du aliaj ne povas ĉar la 4-an de januaro devas partopreni en senataj komisionoj.

Edward Kozyra

4401 SCIENCAJ KAJ FAKAJ VERKOJ EN ESPERANTO



Por ricevi sian universitatan diplomon studentoj en Hungario devas fari ankaŭ ekzamenon pri iu fremda lingvo. En baza, bakalaŭra nivelo en multaj universitatoj ankaŭ Esperanto estas akceptata, sed en mastera grado (msc) – laŭ pasintjara leĝo - oni akceptas nur tiujn lingvojn, en kiuj pruveble ekzistas scienca kaj faka literaturo.

Por helpi la studentojn de la koncernaj fakoj en la Esperanto-Centro Eventoj ni kompilis libro-liston pri fakaj verkoj kaj sciencaj libroj eldonitaj aŭ aperintaj en Esperanto – nekonsidere ilian nunan aĉetebilon.

Nia listo enhavas 4401 elementojn de la sekvaj fontoj:

- ĉiuj materialoj de STEB (Scienca kaj Teknika E-Biblioteko) ĉe www.eventoj.hu;
- libroj en la libroservo de UEA en kategorio scienco kaj tekniko;
- libroj kun scienca kaj teknika enhavo en la katalogo de Kolektaĵo Fajszki;
- artikoloj el Scienca Revuo en retejo ĉe Eventoj;
- artikoloj el la scienca revuo Teleskopo;
- artikoloj el Jura Revuo;
- listo pri aperintaj vortaroj en la retejo de UEA;
- enhavo de la verko "Fakverkoj" de Miroslav Malovec;
- librolisto en broŝuro de Rátkai Árpád pri faka aplikado;
- ktp.

Ni konscias, ke la listo tute ne estas kompleta, nia celo estis nur helpi la juran agnoskon de Esperanto en hungaraj universitatoj.

La kolektaĵo estas atingebla ĉe la adreso: <http://www.eventoj.hu/sciencverkoj/>

La nuna fazo estas rezulto de plurmonata laboro. Se iu volas daŭrigi kaj plikompletigi la materialon, volonte ni transdonas la fontan xls-dosieron. Ni ĝojas, se ni povis iom helpi al la prestiĝo de Esperanto.

Szilvási László kaj Mészáros István,
la kompilintoj

ESPERANTISTOJ EN SEMINARIO PRI JUNAJ EŬROPAJ ENTREPRENISTOJ

Kun plezuro mi informas ke Esperanto ĉeestis en la 4-a seminario pri junaj eŭropaj entreprenistoj: <http://www.eesc.europa.eu/?i=portal.en.events-and-activities-young-eu-entrepreneurs-seminar-2012>

Sara Spano' kaj Francesco Maurelli reprezentos la firmaon Kosmo (kosmo.eu.com - <http://www.facebook.com/KosmoStrategio>). Nur trideko da junaj entreprenistoj en Eŭropo estis invititaj.

Ni fieras iri al Bruselo por reprezenti junan firmaon, tre aktivan internacie, kiu tre ofte helpis Esperanto-organizaĵojn akiri monon por financi agadojn. Certe dum la seminario estos okazo paroli pri nia verda firmaa laborlingvo, kaj pri nia rilato kun E-organizaĵoj kaj sekve pri Esperanto ĝenerale.

La kandidatiĝon subtenis ankaŭ TEJO kaj EVU.

Francesco Maurelli

AGNOSKO DE LA AGADO DE AIS-BULGARIO FLANKE DE BULGARA AKADEMIO DE LA SCIENCIOJ



Bulgara Akademio de la sciencoj (BAS) oficiale celebris 150 jarojn ekde la naskiĝo de prof. Ivan Ŝiŝmanov - eminenta bulgara sciencisto kaj ankaŭ unu el la fondintoj de la E- movado en Bulgario.

La inaŭguro de la oficiala celeburo okazis en la Solena halo de la Akademio. Enkondukan parolon pri la agado de prof. Ivan Ŝiŝmanov faris prof. R. Damjanova - prezidantino de la Organiza Komitato de la celbrado kaj gvidantino de la scienca projekto „Prof. Ivan Ŝiŝmanov kaj la modernigado de la bulgara humanisma scienco“. Post la enkonduka parolo la solenaĵon salutis prof. E. Nikolov, prezidanto de BAS kaj post li s-ino Margarita Popova - vicprezidantino de la Respubliko Bulgario, sub kies protektado estis organizita la solenaĵo.



Tuj post la salutparolo de la vicprezidantino de Respubliko Bulgario sur la oficialan podion estis alvokita saluti la solenaĵon prof. Boĵidar Leonov kiel prezidanto de AIS-Bulgario kaj de BEA. En sia salutparolo li esprimis dankon pro la honoro esti invitita partopreni la solenaĵon kaj pro la komencita kunlaboro inter Bulgara Akademio de la sciencoj kaj AIS-Bulgario, pri la pozitiva rilato de la Akademio al la agado de AIS-Bulgario. Fine li honorigis la Akademion per la jubilea medalo »D-ro Zamenhof« transdoninte ĝin al la gvidantino de la solenaĵo. Tiu ĉi honorigo

estis akceptita kun dankoj esprimitaj de la Akademia Estraro kaj aplaŭdoj flanke de la ĉeestintaj akademianoj!

Post la salutparolo de prof. B. Leonov sekvis la salutparoloj de la bulgaraj universitatoj kaj sciencaj institutoj. Informo pri la solena Inaŭguro estis prezentita dum la vesperaj novaĵoj de TV. Sekvontan tagon, dum la jubilea Konferenco, prof. Boĵidar Leonov prelegis antaŭ la akademianoj kaj profesoroj de bulgaraj universitatoj pri la temo »La agado de AIS-San Marino, AIS-Bulgario kaj bulgaraj esperantistoj por realigo de la ideoj de prof. Ivan Ŝiŝmanov pri la apliko de Esperanto en la internaciaj kontaktoj inter la sciencularo«.

Boĵidar Leonov

NOVAĴOJ EL KIPRO


La jaro 2013 estos tre grava jaro por esperantismo en Kipro, ĉar baldaŭ komenciĝos la unua senpaga kurso de Esperanto en lingvolernejo de Limasolo, kaj oni antaŭvidas ĝis la printempo kromajn paŝojn por disvastigo de Esperanto en la insulo: ebla enkonduko de Esperanto kiel fremda lingvo instruota en teknika altlernejo de la urbo aŭ eĉ en la loka universitato. Mi estas en kontakto kun la respondeculoj de tiuj ejoj kaj mi atendas respondon, espereble pozitivan.

Mi ankaŭ volas malfermi oficiale E-asociacion en Kipro. Oni ne plu povas atendi. Maloficiale ĝi jam ekzistas kaj, kadre de ĝi, okazos la eventoj de la venontaj monatoj (unua kurso, eble dua kurso, prelego...). Sed oni bezonas oficialecon.

La retpaĝaro (www.kipr.weebly.com) jam estas pretigata kun iom da informoj en la greka pri nia agado kaj Esperantismo ĝenerale. Mi estas certa, ke ĝis la fino de ĉi-jaro UEA akiros minimume 7-8 membrojn en Kipro.

Roberto Pigo

Ekzistas nova kristnaska kanto en Esperanto! – Iniciato el Kipro



La 8-an de decembro aperis enrete "Kredu Kristnaskon". Ne temas pri la kutima traduko aŭ adapto de internacia melodio, sed eble pri la unua kristnaska kanto originale verkita - kadre de bonfara projekto – en Esperanto. La kanto estas profesie aranĝita kaj kantita de juna itala kantistino. La verkinto estas D-ro Roberto Pigo, itala Esperantisto, kiu vivas en Kipro, instruas tie la italan en liceoj.

La oficiala retejo de la kanto kun ĉiuj necesaj informoj pri la iniciato kaj la manieroj ĝin havigi al si, estas www.kredukristnaskon.weebly.com. Por aŭskulti senpage mallongan specimenon, oni serĉu la kanton ĉe Youtube (<http://www.youtube.com/watch?v=LjVYX34Z-g0>) aŭ vizitu rekte: <http://kredukristnaskon.weebly.com/uploads/1/4/7/7/14776524/demo.mp3>

Oni invitas ĉiujn esperantistojn (sed ne nur ilin) subteni tiun bonfaran projekton aĉetante la kanton kontraŭ laŭeble minimuma donaco de 1,35 eŭro (kio ebligos ricevi la kanton sed ankaŭ la sonbazon, la tekston kaj la partituron) aŭ de 0,85 eŭroj (kio inkluzivas nur la kantitan version). La prezoj inkluzivas retenon de ĉ. 0,35 eŭroj flanke de la sistemo PayPal, bedaŭrinde neeviteblan.

Pli altaj donacoj memkompreneble estas favore akceptataj, ĉar la tuta kolektota mono estos uzita por subteni la bonfaran kampanjon "Every one" (www.everyone.it) de "Save the children" (= Savu la infanojn), favore al afrikaj infanoj, kiuj ne havas kuracilojn kaj aliron al edukado kaj bedaŭrinde konstante mortas pro malsato.

Utilaj informoj:

- Per 250 eŭroj ni sukcesos doni 8 nigrajn tabulojn, 8 viŝilojn kaj 16 kret-skatolojn por ebligi la lernadon de geknaboj el 8 klasoj.
- Per 76 eŭroj, ni ebligos terapion por 9 infanoj ege subnutritaj, pere de kompleta traktado.
- Per 42 eŭroj, ni provizos kontraŭ-kul-vualon por protekti 12 infanojn kontraŭ malarie en Mozambiko.

Ĉio ĉi pere de simpla, bela kanto!

Por aĉeti "Kredu Kristnaskon" pere de la sistemo PayPal, oni sendu la elektitan monsumon rekte al la aŭtoro de la kanto. Adreso: destinazionecipro@gmail.com
Por proponi aliajn pagmanierojn, ekzemple uzante la UEA-konton de la aŭtoro (rpig-a), donacante rekte al "Save the children" per propra karto (kaj poste sendante ian ajn pagatestilon por pruvi la donacon), aŭ sendante kontribuon perbanke ktp ktp, oni skribu al la sama retadreso. Respondo alvenos tuj.

Ene de kelkaj horoj, la aĉetintoj ricevos la kanton kaj vidos - se ili tion deziras - sian nomon en la retejo.

Roberto Pigro

LEĜOPROJEKTO PLIAKRIGAS LINGVOBATALON EN IBERA DUONINSULO



La 3-an de decembro la hispana ministro pri edukado, José Ignacio Wert, diskonigis malneton de nova leĝoprojekto pri edukado. La nova leĝoprojekto evidentiĝas klerikala, novliberalisma, centrizisma kaj naciisma. Kompreneble la leĝoprojekto levis multajn kontraŭajn reagojn el diversaj devenoj, tamen, plej flamis la reagoj en Katalunio. Asocioj, sindikatoj, partioj vokis al malobeo al la leĝo, se ĝi estas aprobita. La prezidanto de la kataluna registaro kunigis ĉiujn partiojn favorajn al la nuna sistemo, kiuj konsistigas 80% de la kataluna parlamento, kaj organiziĝis komuna politika fronto kontraŭ la nova leĝo. London la 10an de decembro 5000 homoj manifestaciis kontraŭ la leĝo en Barcelono, interalie reprezentantoj de Kataluna Esperanto-Asocio, kiu aliĝis al la protestoj.

Evidente, la hispana registaro atendis la okazigon de la elektoj en Katalunio la antaŭan semajnon, por diskonigi sian projekton. Du trionoj de la nova kataluna parlamento favoras la okazigon de referendumo, por ke la katalunoj decidu, ĉu ili deziras starigi novan sendependan ŝtaton. La hispana registaro plene kontraŭstaras tian konsulton. Laŭ la opiniondoj de la lastaj du jaroj, plimulto de katalunoj favoras sendependiĝon. Tiu opinio ŝajnas gajni subtenon pro sinsekvaj agadoj de la hispana registaro, elektita post la venko de la Popola Partio (PP) en la parlamentaj elektoj de novembro 2011. PP estis fondita de eksministro de generalo Franco kaj en siaj unuaj jaroj eksplicite defendis la heredaĵon de la diktaturo. Dum la 80aj kaj 90aj jaroj ĝi iom moderigis sian centrizismon kaj naciismon, sed ĝi denove radikaliĝis en la lasta jardeko. Opinisondo farita de la ĉefa hispana ĵurnalo, El País, en la komenco de septembro

montras, ke la kvanto de hispanianoj favorantaj la likvidon de ĉia aŭtonomeco kaj la reveno al centralizita ŝtato kreskis al 29%, dum en 2003 nur 10% tiel opiniis. Klara plimulto de la homoj tiel opiniantaj voĉdonas por PP. Reage al tia sinteno kaj al diversaj verdiktoj de la konstitucia kaj plej supera tribunaloj de Hispanio en la lastaj jaroj limigantaj la aŭtonomecon de Katalunio radikaliĝis la kataluna publika opinio en la kontraŭan direkton, tiel ke miliono da homoj manifestaciis sur la stratoj de Barcelono en julio 2010 kontraŭ la subfoso de la kataluna aŭtonomeco kaj miliono kaj duono en septembro ĉi-jara rekte por la sendependiĝo de Katalunio.

La nova leĝopropono devas esti komprenata kiel plia paŝo en la pligraviĝo de la krizego inter la plicentrismo de la plimulto de la hispana socio kaj la deziro de grandega plimulto de la katalunoj konservi aŭ pligrandigi la nunan aŭtonomecon. Aparte rimarkindas, ke la leĝon lanĉis la ministro, kiu plej multe elstarigis sin per sia naciismo, kaj kiu aparte disfamiĝis per sia aserto oktobre en la hispana parlamento, ke la celo de la hispana registaro estas "hispanigi la katalunajn infanojn". Tiel la leĝopropono permesas al la hispana registaro pli multe difini la enhavon de la studobjektoj ol antaŭe. Ĝi fortigas ankaŭ la pezon de la hispana lingvo en la edukado kaj devigas la ekziston de instruado en ĝi en la tuta ŝtato. Samtempe, la kataluna, galega, eŭska kaj okcitana lingvoj, oficialaj en 6 el la 17 aŭtonomaj komunumoj de Hispanio, estas konsiderataj nur "specializiĝaj" studobjektoj, kio bone bildigas la sintenon de la hispana registaro pri la ilia duarangeco kaj nedevigo lerni. Male, nenio en la nova leĝo celas efektiviĝi la rajton de la pli ol 100 000 valenciaj infanoj, kiuj regule petadas instruadon en la kataluna lingvo, sed estas instruataj en la hispana danke al la lingvopolitiko de PP, reganta en Valencilando.

La ĉefaj celoj de la eduksistemo en Katalunio, kiun la nova edukleĝo celas disrompi, estas unuflanke ne dividi la lernantojn laŭ lingvoj kaj aliflanke certigi la regon kaj de la kataluna kaj de la hispana lingvo. Esence, la kataluna lingvo estas la sola instrulingvo en la elementa lernejo, kaj tiucele estas uzata kvebek-devena pedagogio permesanta glatan instruadon en lingvo, kiu ne estas denaska por la plimulto de la lernantoj. Ekzistas aparta helpo por la infanoj, kiuj spertas problemojn (preskaŭ senescepte, temas pri infanoj ĵus alvenintaj el aliaj landoj, kiuj ankaŭ ne scipovas la hispanan). En la mezlerneja instruado ankaŭ la hispana estas uzata kiel instrulingvo, ofte je la sama nivelo de la kataluna aŭ eĉ pli. Tiel ke la hispana estas la hegemonia lingvo en la socio, per tiu sistemo la lernejoj akiras tute bonan regadon de ĝi. Laŭ diversaj komparaj esploroj, i.a. PISA, fine de la instruado la katalunaj lernejoj ricevas pli bonajn rezultojn pri la hispana ol la mezumo de Hispanio, inkluzive de regionoj, kie ĝi estas la denaska lingvo de la vasta plimulto de la lernantoj. Tiu eduksistemo funkcias preskaŭ 30 jarojn kaj ricevis tre diversajn gratulojn, i.a. de UNESCO, ĉar ĝi sukcesas glate dulingvigi la novajn generaciojn kaj igi, ke la kataluna estu normale uzebila en preskaŭ ĉiu socia kunteksto. Pro tio ĝi estas forte subtenata de grandega plimulto de la kataluna socio, sendepende de sia deveno kaj denaskaj lingvoj, kaj estas konsiderata kiel plej verŝajne la ĉefa atingo de la lastaj jardekoj por tute paca kunvivado de la lingvoj en Katalunio. Estas malfacile prognozi la estonton de la leĝo. La komforta plimulto de PP en la hispana parlamento sendube povos ĝin aprobi, sed tio evidente eĉ pli fortigos la secesion de la plimulto de la katalunoj.

Hèctor Alòs i Font

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 31-an de decembro 2012

Redaktoro: Zlatko Tišljär

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljär, Jozef Rreinvart, Spomenka Štimec, Ivan Špoljarec, Roberto Sartor, Yu Jianchao, Edward Kozyra, Szilvási László kaj Mészáros István, Francesco Maùrelli, Bojidar Leonov, Roberto Pigro, Hèctor Alòs i Font.

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

